

eIna newsletter

Newsletter published by the Esperanto League for North America

Winter 1995/1996

Novjara mesaĝo de nova prezidanto

KUN FIERO KAJ UNUIGITA FORTO

Antaŭ sep jaroj, la tiama prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin enkondukis la novan jaron per nova devizo: DUE. Temis pri la strategiaj prioritatoj de UEA, t.e. disvastigo de Esperanto, utiligo de Esperanto, edukado al tutmonda konscio. Surbaze de la strategio, mi havas la taskon realigi ilin kun la helpo de ĉiuj. La novan jaron ni komencu kun memfida kuraĝo kaj freŝaj ideoj.

Se ni rigardas al la pasinta jaro, ni vidas pruvojn, ke UEA jam bone laboras sur la menciitaj kampoj. Per la aliĝo de landaj asocioj el Rumanio kaj Togolando, kaj per ekfunkcio de internaciaj komisionoj pri la movadoj en Azio kaj Ameriko, nia asocio fariĝis pli tutmonda. La brila kongreso en Tampereo verŝajne enhavis rekordan nombron da kulturaj, fakaj kaj movadaj kunsidoj; mi aparte mencias la sukcesan kunlaboron kun Akademio Internacia de Sciencoj, kiun UEA daŭrigos ankaŭ ĉi-jare. Ne lastavice, daŭre restas tre forta kaj konkreta la solidareco inter niaj membroj, montrita interalie per amasa aliĝo al Societo Zamenhof kaj donacado al konto Espero, Fondajo Canuto kaj Fondajo Afriko. Mi persone fieras esti ano de tia movado, kiu se ĝi ankoraŭ ne kapablas igi la mondon paca kaj justa, tamen laboras por mildigi militajn kaj ekonomiajn suferojn - kiel ni faris en Bosnio-Hercegovino.

Sed ni ĉiuj scias ankaŭ ke tre granda restas la laboro antaŭ ni, por konvinki la eksteran mondon pri la graveco kaj utileco de Esperanto. Ŝajnas al mi ke precipe al tiu celo necesas direkti plian atenton. Por ĉi tiu jaro, mi vidas tri ĉefajn prioritatojn.

Unue, la plivastiĝo de Eŭropa Unio kaj la intensiĝo de tuteŭropa kunlaboro alportas pli kaj pli da atento al diversaj lingvaj problemoj, nelaste en la edukstemo kaj sur la kampo de lingvaj rajtoj. Se iu interregistara organizo oficiale

akceptus Esperanton kiel helplingvon, EU verŝajne estus la unua. En tiu senco, Eŭropo estas strategia regiono por nia movado. Mi deziras, ke ĉiuj esperantistoj subtenu la klopodojn de la aktivuloj kiuj laboras por gajni la subtenon de eŭropaj instancoj, interalie por plurlanda eksperimenta instruado de Esperanto kadre de la EU-programo "Sokrates". Ekzistas jam kelkdeko da deputitoj en la Eŭropa Parlamento kiuj principe subtenas Esperanton. Necesas uzi ĉiujn demokratiajn rimedojn por aktivigi ilin kaj kreskigi ilian nombron.

Due, la rilatoj inter UEA kaj kelkaj internaciaj organizoj donas multe da ebloj por praktika kunlaboro. Iuj anoj de la nova Estraro jam vizitis Uneskon (kaj Eŭropan Union) por preparoli ties partoprenon en internacia simpozio pri lingvopolitiko, kadre de la ĉi-jara UK en Prago. La invititaj reprezentantoj (ankaŭ el UN kaj aliaj organizoj) povos rekte mem sperti, ke Esperanto estas ne plu projekto sed realaĵo. Ni ankaŭ planas konferencon pri instruado de Esperanto en 1997, kiel eron de la konferenc-serio "Linguapax" de Unesko. La aranĝoj omaĝas samtempe du grandajn pionirojn de la batalo por Esperanto: Inazo Nitobe, Asistan Ĝeneralan Sekretarion de la Ligo de Nacioj, kiu antaŭ 75 jaroj partoprenis en la 13-a UK en Prago kaj verkis gravan raporton pri siaj spertoj; kaj Edmond Privat, kiu iniciatis la grandiozan Konferencon pri Instruado en Lernejoj en 1922, sub la aŭspicio de la Ligo.

Trie, ekzistas multaj socie influaj homoj kiuj ne parolas Esperanton sed ŝatas la ideon ligitan al la lingvo, t.e. la strebon al justa kaj paca mondo ankaŭ sur la kampo de komunikado. Ili estas gravaj "amikoj de Esperanto", kiuj povas esti bona protektmuro de nia movado kaj subtena forto por niaj projektoj. La Estraro nun esploras manierojn gajni la subtenon de tiu valora amikaro. Mi jam

nun invitas la landajn asociojn kunlabori por gajni "amikojn de Esperanto" sialande.

Por sukcesigi tiujn novajn projektojn, aktiva subteno kaj partopreno de niaj membroj estas nepre bezonata. Ni devas agi ekstere, ne nur en Ago-Tago, sed ago-monate, kiel brazilaj aktivuloj jam faris, aŭ eĉ ago-jare. Ni devas ankaŭ aparte kuraĝigi kaj subteni la junularan agadon, speciale por grandigi la nombron de esperantistoj kiuj estonte partoprenos kaj gvidos la movadon. Granda helpo tiurilate povus montriĝi la nova videofilma kurso *Mazi en Gondolando*, sukcese lanĉita de Internacia Esperanto-Instituto dum la kongreso en Tampere.

Parolante pri estonteco, mi volas esprimi elkoran dankon al homo, kiu dum la pasintaj 23 jaroj fariĝis preskaŭ kromnomo de UEA. Jam en pasinta aprilo mi eksciis, ke Simo Milojević deziras demisi kiel ĝenerala direktoro de UEA fine de la jaro 1995. Feliĉe, li restos labori en la Centra Oficejo, kie ni daŭre profitos de lia akumulita scio, dum la vakanta posteno akceptis Osmo Buller, nia tre sperta oficeja direktoro. Mi havas bonan kialon antaŭvidi tre pozitivajn rezultojn de tiuj decidoj, kiuj montras grandan sindediĉojn al UEA.

La nova jaro komenciĝas esperplene por nia Asocio, kun unuigita forto de niaj membroj, niaj aktivuloj, niaj oficistoj, niaj estraranoj. Ni uzu tiun fortan saĝe. Nia tasko ja estas ne nur disvastigi la lingvon aŭ uzi ĝin por personaj celoj, sed ankaŭ kontribui al la mondaj paco kaj interkompreniĝo laŭ la tradicio de Zamenhof kaj Hodler. Tiu plej alta celo devas inspiri nian agadon. Ni agu kun fiero kaj espero!

Mi deziras feliĉan kaj prosperan novan jaron al ĉiuj niaj membroj kaj samideanoj.

Lee Chong-Yeong
Prezidanto de UEA

From the Central Office

During the past nine months or so, you may have been looking (in vain!) for your copy of *Esperanto USA*. Unfortunately the editor, Don Harlow, has been under so much pressure at his job that he has been unable to devote sufficient time to prepare an issue for publication. This ELNA Newsletter is intended to fill that information gap.

The membership campaign got off to a somewhat early start as we sent out the materials in the first part of November, rather than late in that month, as is normal. Yet this year's membership renewals are lagging somewhat behind last year's pace. I am sure that much of the reluctance to rejoin ELNA is based on the lack of the newsletter. I hope that we shall soon be back on track, and that those of you who have not yet rejoined will consider renewing your support in anticipation of the return of our high-quality newsletter.

We are still seeking a new editor! If you have a flair for page layout, thorough mastery of Esperanto and a desire to serve the Esperanto movement in the United States and beyond, please contact me here at the Central Office. It is actually a fun and rewarding task which provides good positive feedback in the form of compliments, congratulations and thanks.

The 1996 Book Catalog has just gone to the printer. Current ELNA members and Friends of Esperanto will receive their copy quite soon if they have not already received it. Quite a few new book titles appear in this year's catalog, as well as several new miscellaneous items. And as always, ELNA members receive a discount on all books, etc.

The CEED has been selling at a fairly brisk rate through its nine months of availability. We have sold almost a third of the first printing, even though an official review has not yet been printed in *Esperanto USA*! (I am sure that this review will appear in the next issue, whenever the editor can scrape together enough time to complete it.) Here in California, the Ligo

de Orient-Golfaj Esperantistoj took up a collection to place the CEED in the Berkeley Public Library; so now it is available for anybody to use. And it serves as a reminder to library patrons that Esperanto is not dead! I suggest that your local club organize a similar project, or that you consider making an individual donation.

This summer there will be a rich variety of Esperanto congresses, courses, excursions, etc. Some are described in detail elsewhere in this issue, so I will only provide a quick listing here.

The most important in the context of this newsletter is the ELNA Congress, which will be in Detroit, Michigan from the thirteenth til the fifteenth of July. Sherry Wells, ELNA's vice president and leader of the local congress committee, is hard at work with the other committee members to arrange an interesting and fun Congress. Soon we shall be sending out registration forms, schedules of planned events, etc. Mark your calendars and make plans to come to our congress, where you will meet new friends and practice your Esperanto. Directly following our Congress, many participants will fly to Prague to take part in the Universala Kongreso in that beautiful and lively city. For the week following, travellers will have to choose between the Internacia Junulara Kongreso in Güntersberge, Germany and a nine-day excursion through Romania, guided by our friend Ionel Oneț. This excursion will be a unique opportunity to meet many Romanian Esperantists and other friends of Ionel.

Just prior to ELNA's Congress, there will be several different opportunities to study the International Language in a formal classroom situation. San Francisco State University will have its customary four sections of Esperanto. One of the teachers will be Derek Roff, a member of ELNA's Board of Directors. The other teachers will be Katalin Smidéliusz from Hungary and Hisasi Kitagawa from Japan. Dorothy Stermer will be assisting the students

and leading conversation sessions outside of class. The University of Hartford will host a one-week intensive course again this year. The teachers, Spomenka Štimec (Croatia) and Joseph Conroy (USA), will conduct three levels of instruction. And Sherry Wells has also scheduled several week-long intensive courses at her home near Detroit. Contact Sherry for more details.

This is an election year - and not only in politics! ELNA members must also elect a new president, vice president and three board members. If you wish to propose yourself or somebody else as a candidate for any of these positions, please contact me or any of the other members of the nominating committee: Prenda Cook, Rochelle Grossman, Sybil Harlow & Lusi Harmon.

We have received copies of two official proclamations recognizing International Friendship Week and Esperanto's role in promoting peace and good will. The Esperanto Society of Chicago and the Esperanto Circle of Santa Barbara were responsible for these proclamations. This is a clever and commendable method of calling attention to Esperanto. It is not too late to convince your local mayor to issue such a proclamation. Please contact me for advice or with success stories. International Friendship Week is traditionally observed during the last full week in February.

I am always glad to hear of new methods and strategies of making people aware of the real-world applications of Esperanto. Or even fictional applications! Anybody writing a novel should consider creating a character who speaks Esperanto. Harry Harrison's *Stainless Steel Rat* series have helped many readers discover the International Language.

Miko Sloper
Director of the C.O.

Raporto de la Ĉefdelegito de UEA en Usono

Karaj Gesamideanoj,

Al ĉiuj Usonaj geesperantistoj mi kun plezuro donas ĉi tiun koncizan raporton pri lastatempaj gravaj okazaĵoj en la internacia E-movado.

Ĉe la Universala Kongreso de Esperanto en Tampere, Suomio en julio, la Komitato de UEA elektis novajn prezidanton kaj estraron. Kun plezuro mi informas vin pri la elekto de prof-o d-ro LEE Chong-Yeong al la posteno de prezidanto de UEA. D-ro Lee estas profesoro pri ekonomiko kaj merkato ĉe grava Korea universitato, kaj prezidanto de la Korea Esperanto-Asocio. Li gvidis la sukcesegan UK en Seulo en 1994 kiel ĝenerala sekretario de la LKK. Li estas klera, kapabla kaj dependebla persono.

Elektiĝis kiel vicprezidanto René Triolle, foje sekretario de TEJO, longtempa aktivulo en Francio; kiel ĝenerala sekretario Mark Fettes, novzelandano, kiu efektive jam funkciadis en tiu rolo depost la demisio de Ian Jackson; kiel estraranoj Michela Lipari, itala ŝtato-ficisto, antaŭa estrarano, kiu speciale respondecas pri kongresoj; Amri Wandel, israelano, astrofizikisto, kiu speciale respondecas pri faka agado kaj scienco; Povilas Jegorovas, litovo, advokato, prezidanto de la Litova Esperanto-Asocio; kaj Fred de Geus, nederlandano, komputilisto, kiu prenas sur sin la respondecon pri financoj.

Supervide la nova estraro de UEA estas pli juna grupo, kiuj tamen havas sufiĉe da sperto pri organizado, planado kaj administrado. La vikleco de ĉi tiu nova estraro tuj ekvidebliĝis per tio, ke jam du monatojn post sia elekto, la estraranoj jam kunvenis en Roterdamo kaj tie ellaboris laborplanon (pri kiu plena raporto legeblas en la novembra *Esperanto*). Lige kun tiu vizito, prezidanto Lee kaj estraranoj Fettes kaj Lipari vizitis la oficejon de la Eŭropa Unuiĝo en Bruselo, kie akceptis ilin Komisionano Emma Bonino; poste, prezidanto Lee kun Mark Fettes kaj Amri Wandel esploris

kunlaboron de Internacia Asocio de Universitatoj kun la direktorino de tiu grupo. Dum dutaga restado en Parizo, estrarano Wandel kontaktis reprezentantojn de ses internaciaj organizoj de UN, kaj ankaŭ renkontis diversajn Unesko-oficistojn (plena raporto en la decembra *Esperanto*).

Do ni rajtas anticipi plivastiĝon de la agadkampo por Esperanto, dank' al la jam komencitaj iniciatoj de la nova estraro, kaj al la agemaj komisiitoj kaj komitatanoj de UEA. Viaj membro-kotizoj subtenas tiun laboron, kaj kompreneble vi deziras daŭre subteni la gravan laboron internacian per renovigo de via membreco por 1996, se vi ne jam tion faris.

Pri la Delegita Reto: nova regularo por la delegita reto adoptiĝis fare de la Komitato en Tampere. Jam komenciĝis (kaj preskaŭ finiĝis) la laboro de "re-elekto de delegitoj". Se vi estas delegito, vi jam ricevis respondilon de UEA, kiun vi (espreble) jam plenumis kaj resendis al mi por aprobo kaj plusendo al la centra oficejo de UEA. Tio rajtigas vian aperon en la 1996a *Jarlibro*. Se vi ne respondis, vi ne plu estos delegito. Ni ĉiuj estas dankemaj al tiuj dediĉitaj esperantistoj kiuj, kiel delegitoj, restas pretaj servi al la esperantistaro. Miajn dankojn al vi ĉiuj. Alia grava ŝanĝo: por estiĝi kaj/aŭ resti delegito, membreco en UEA devas esti individua; nur Membro-Abonanto aŭ Membro-Jarlibro rajtas esti delegito; Membro-Gvidlibro ne plu rajtas esti delegito.

Estas mia tasko reprezenti la internacian movadon en Usono. Se vi havas demandojn aŭ proponojn, mi estas je via servo.

William. R. Harmon
Ĉefdelegito de UEA en Usono

From our Secretary's Desk

If ELNA made new year's resolutions like so many individuals, I think it would be to improve communications between the organization and its members. 1995 has been a year of minimal communication because of unforeseen work requirements of our President and *Esperanto usa* editor Don Harlow. The Central Office has been very creative in its efforts to keep the membership informed of ELNA activities, but it can't replace the smooth flow of information that we have had in the past. We can look forward to changes in 1996.

The nominating committee has been diligently searching for candidates for the positions of president, vice-president, and three members of the board. The slate of officers should be ready soon and you will be receiving information about the candidates.

Vice-president Sherry Wells is working hard on the up coming ELNA annual meeting to be held in Detroit, Michigan, July 12-15. According to Sherry, Detroit has gone through a period of renovation lately, and has much to offer convention goers and visitors. She has picked a lovely site for us at the Holiday Inn Fairlane in the Convention Center. More details and registration materials will be sent out soon.

Treasurer Doug Leonard has recently issued the second quarter budget report showing that ELNA is closely following the budget for 1995-6 with a few exceptions as usual. Doug generously donated a 386 computer to the Central Office to upgrade a 286 machine and to help facilitate the work of both Miko and Ionel.

The Catherine & William Schulze Education Fund committee is busy preparing for the third and last year of the three year campaign to raise \$100,000 to honor Bill and Cathy and to establish a stable source of funding for educational projects of ELNA. During the last two years almost \$25,000 has been raised. The committee is hoping for many generous contributions to bring that number closer to the original goal. Look for the campaign information in the mail around the end of February.

For those who have interest in what ELNA did last year the Annual Report of 1995 is still available free from the Central Office.

Ellen M. Eddy

VIDI LA MONDON PER VIRINAJ OKULOJ

tre persona sperto ĉe la Neregistara Forumo pri Virinoj, Pekino '95

Ĉi tio estis kaj "ĝojigajo" kaj "malĝojigajo"; kaj bonaj kaj malbonaj aferoj okazis. Mi estas kuraĝigita kaj malkuraĝigita rezulte de la sperto, sed la sperto estis sendube memoriga kaj emociiga.

Samkiel multaj virinoj en la mondo, kiuj ne havas rektan rilaton kun la Unuigintaj Nacioj, mi aŭdis pri la venanta konferenco pri virinoj en Pekino, kaj pensis: "Tio ja estus interesa afero por ĉeesti!" Sed mi neniam estis aktiva en la virinaj movadoj; la konferenco estis planita dum somero kiam mi estas plej okupata, kaj kiam la vetero en Ĉinio estas terure varma kaj humida; kaj mi vere ne havis ian ideon, kiel mi partoprenus, des malpli kiel mi povus kontribui.

En januaro 1995 mi ricevis leteron de Japanaj Esperantistinoj konataj al mi, petantaj ke mi partoprenu kun ili en plano prezenti bezonon por Esperanto en la internacia kunsido. Post leteroj, telefaksoj kaj e-poŝtaĵoj mi fine promesis ke mi venos, se eble.

La komplika proceduro registriĝi kaj fari hotel-aranĝojn tra la UN komenciĝis. La plej granda internacia konferenco kiun mi iam antaŭe partoprenis estis 5000-homa, kaj tio estis tro granda spite al la uzo de sola komuna lingvo, Esperanto. En Ĉinio estos multe pli ol 15,000 - fakte inter 30,000 kaj 40,000! Ĉu Ĉinio povus trakti tiom? Ĉu tion povus iu ajn lando? Kaj ĉu la UN povus registri tiom da virinoj el ĉiuj mondpartoj, kiuj ne parolas la anglan? La formularoj estis presitaj en la Ĉina kaj la Angla. Kvankam mi legas mian propran lingvon tre bone, estis malfacile kompletigi la formularojn. Iom post la komenco de tiu proceduro, mi ricevis telefonvokon de filino de amikino, dungita portempe ĉe la UN por helpi dum la registrado. Ŝi vokis min persone por pridemandi unu el la demandoj en la formularo. Se ŝi ne estus tion farinta, mia aliĝilo irus en la milojn de aliaj nekompletaj, kiuj estis flankenmetitaj ĝis post la limdato!

Kaj Ĉinio deziris ke ni, "riĉuloj", loĝu nur en la luksaj hoteloj, ke la malluksaj estu ŝparitaj por anoj de pli malriĉaj landoj; sed po \$260 nokte plus flugbileto estis preter mia buĝeto. Poste okazis tumulto kiam Ĉinio proponis ŝanĝi la kon-

ferenc-lokon al suburbo kie oni konstruas tute novan instalaĵon por foiro, kun amasloĝejoj. Baze ili ofertis al ni loĝadon je po \$15 nokte! Nu, kiel vojaĝagento mi vizitis Ĉinion kvar fojojn antaŭe; kaj mi decidis ke la nova "malaltbuĝeta" loĝejo en Huairou estus pli pura kaj probable pli bona ol mez-preza hotelĉambro en Pekino. Mi decidis riski tion.

Kaj oni raportis, ke Ĉinio ne plu aprobas viziojn por partoprenantoj! Bella Abzug kaj miloj da aliaj ne povus iri! Bonŝance mia estinteca sperto kun la Ĉina konsulejo en San Francisco estis tute kontentiga. Je la 9a matene, du tagojn antaŭ la foiro, ĉiuj necesaj dokumentoj estis liveritaj al la konsulejo. La sekvantan matenon je la 9a, la vizo estis preta.

HOMAJ RAJTOJ
ESTAS VIRINAJ RAJTOJ;
KAJ VIRINAJ RAJTOJ ESTAS
HOMAJ RAJTOJ!

Miaj Japanaj amikinoj alvenis en Huairou unu tagon antaŭ ol mi. Ili decidis renkonti min ĉe la Pekina flughaveno - dank' al Dio! Tro multaj personoj kun tro multe da timo (ambaŭflanke) kaj maltro da komunikado - rezulto: absoluta ĥaoso! Alvenintan ĉe la nefinitaj apartamentoj post noktomezo la 31an de aŭgusto, min frontis la neceso grimpi ses etaĝojn da ŝtuparoj sen lifto! Sed mia kunĉambranino kaj mi kaj tri junaj Ĉininoj, ĉiu kun po unu el miaj valizoj kaj unu kun la ŝlosilo, peze suprenpaŝis ĝis la plej supra etaĝo. Tie la virino kun la ŝlosilo frapis tre laŭte sur la pordo - ripete, ŝajne por averti tiujn en la ĉambro ke ni finfine alvenis. Se la tuta apartamentaro ne estis jam vekiginta, ĝi ja estas nun!

Nia nefinita apartamentaro havis tri enirejojn, ĉiu kun ŝtuparo kaj apartamentoj flanke de ĉiu ŝtuparo. Ĉiu apartamento havis tri litĉambrojn, banĉambron, grandan salonon, manĝejon kaj kuirejon; kaj balkonon de kie videblis la bela

pejzaĝo de la ĉirkaŭaj montoj. Ni havis multe da spaco; sed preskaŭ neniam da mebloj. Ni havis du litojn en la dormĉambro, unu tablon inter ili, kaj unu veststangon. Mi neniam en la vivo dormis sur pli malmola lito; nur lignotabulo kun kuseno sur ĝi, apenaŭ sufiĉe dika por kovri splitojn. Malgraŭ tio mi dormis tre bone dum la malmultaj horoj kiam mi estis en la ĉambro. (La Ĉinoj laŭraporte esperas finkonstrui tiujn apartamentojn kaj uzi ilin por helpi solvi la grandan mankon de loĝejoj.)

Unu vesperon, mi revenis malfrua, malseka kaj laca. Mi rigardis tiun longan 6-etaĝan ŝtuparon kaj ĝemis. Sed tuj saltis ĝis mi la du junaj Ĉininoj deĵorantaj. Unu prenis miajn monsakon kaj ombrelon, la alia mian sakon kun ĉiuj pezaj paperoj kiujn mi kolektis dum la tago. Ili prenis min je la brakoj kaj promenigis min supren laŭ la ŝtuparo. Mi konfesas ke mi estis ja tro laca kaj dankema por esti embarasita!

Nia partoprenado evoluis el deziro flanke de grupo da Japaninoj el Itabaŝi, Tokio, prezenti sian 4-jaran studadon de la vivoj de virinoj almenaŭ 85-jaraĝaj, kiuj vivis en tiu regiono. Koscio de malegaleco inter la seksoj estas mapli agnoskata en Japanio kompare kun Usono. Sed tiuj virinoj opiniis, ke per studo de la vivoj de la samtempulinoj de siaj avinoj, ili lernus pli pri la propra stato. Tre Japaneca metodo! Ilia enketado kondukis ilin al la konkludo, ke la rajtoj de virinoj estas **homaj** rajtoj kaj kvankam kondiĉoj pliboniĝis dum la jaroj, la sistemo ankoraŭ estas baze maljusta kaj malbona por ambaŭ seksoj. Eĉ hodiaŭ, patrinoj senkonscie edukas siajn filinojn konsideri sin iloj, uzotaj por funkciigi la familion bone kaj feliĉe.

La Japana titolo de tiu verko tradukiĝas "Virinoj vivantaj en Itabaŝi - vivhistorioj", kaj la verko estis eldonita el la propraj poŝoj de la aŭtorinoj. Dezirante ŝanĝi siajn proprajn pensmanierojn, ili ankaŭ deziris dividi siajn progreson kaj metodon kun aliaj, ne nur en Itabaŝi, ne nur en Japanio, sed en la tuta mondo. Ĉi tion ili ne povis fari mem, ĉar la Japana ne estas vaste uzata lingvo, kaj ne estis unu el la oficialaj lingvoj de la

ALĜILO - REGISTRATION FORM

NAME(s): _____

(As shown in passport - please print)

ADDRESS: _____

CITY: _____ STATE/ZIP _____

TEL.(home)[_____] (bus.)[_____] _____

I want to share with _____.

Please help me find a roommate.

I smoke do not smoke.

I/we wish to register for:

Vyšehrad Hotel, Prague 19-28 July
(deposit 4 nights @ \$60 shared =
\$240, \$95 single = \$380)

Post-UK Excursion 28 July-5 Aug.
Romania/Budapest (Deposit \$350 per
person)

Please make flight arrangements for
me/us to leave Detroit other
city _____ on July _____
and returning _____.

Send deposit check with your application to: Esperanto Vojaĝ-Servo, 6104 LaSalle Ave., Oakland 94611

TERMS AND CONDITIONS

1. Deposits as shown on the application are required in order to confirm participation. Confirmation is based on first come-first served availability.

2. Final deposit is due 60 days before departure, i.e., May 19 for the hotel and May 28 for the post-UK ekskurso.

3. Cancellation must be received in writing. Penalties are as follows:

• Full refund will be made less \$100

• per person administrative fee if

• cancellation is received 90 or more days before departure.

• A cancellation fee of \$250 per person will be assessed if cancellation is received between 60 and 89 days prior to departure.

• For cancellations received between 30 and 59 days before departure, 50% of the total tour/hotel costs must be assessed.

• No refunds can be guaranteed for cancellations received within 30 days prior to departure.

• The right is reserved to cancel the tour if the number of participants falls below 20 persons, the minimum group requirement.



CONSUMER DISCLOSURE NOTICE: Berkeley's Northside Travel Inc. (dba Esperanto Vojaĝ-Servo) acts only as agent for the hotels, airlines, bus companies, railroads, ship lines or owners or contractors providing accommodations, transportation or other services and all coupons, exchange orders, receipts, contracts and tickets issued by Berkeley's Northside Travel Inc. (dba Esperanto Vojaĝ-Servo) are subject to any and all tariffs, terms and conditions under which any accommodations, transportation or any other services whatsoever are provided by such hotels, airlines, bus companies, railroads, ship lines or owners or contractors or by persons in their employ. On advancement of deposit for tour participation, and by the acceptance of tour membership and/or such coupons, exchange orders, receipts, contracts and tickets, the tour participant agrees to the foregoing and also agrees that neither Berkeley's Northside Travel Inc. nor any of its affiliates or subsidiaries nor Esperanto League for North America, Inc. shall be or become liable or responsible for any loss, injury or damage to person, property or otherwise in connection with any accommodations, transportation or other services resulting directly or indirectly from acts of God, dangers incident to the sea, fire, breakdown in machinery or equipment, storm, floods, act of government or other activities, de jure or de facto wars, whether declared or not, hostilities, civil disturbances, strikes, riots, thefts, pilferage, epidemics, quarantines, medical or customs regulations, defaults, delays or cancellations of or changes in itinerary or schedules, or from any causes beyond the control of Berkeley's Northside Travel Inc., or for any loss or damage resulting from insufficient or improperly issued passports, visas or other documents and that neither Berkeley's Northside Travel Inc. nor any of its affiliates or subsidiaries shall be or become liable or responsible for any additional expenses or liability sustained or incurred by the tour participant as a result of any of the foregoing causes.


Berkeley's Northside Travel Inc. reserves the right to substitute hotels, reverse the order of places to be visited and make such alterations to the itinerary as may be deemed necessary for carrying out of the tour either before departure or enroute, or to withdraw any tour and the liability of Berkeley's Northside Travel Inc. is limited to refund of monies received by Berkeley's Northside Travel Inc. Berkeley's Northside Travel Inc. is not responsible nor liable for defaults of those not directly under the control of Berkeley's Northside Travel Inc.

Berkeley's Northside Travel Inc. reserves the right to decline to accept or retain any person as a tour passenger should such person's health, mental condition, physical infirmity or general deportment impede the operation of the tour or the rights or welfare or enjoyment of other tour passengers. A refund of unused land tour services is the limit of the liability of Berkeley's Northside Travel Inc. and will be paid upon passenger's return home.

The airlines concerned are not to be held responsible for any act, omissions or event during the time passengers are not on board their aircraft and/or conveyances. The airline tickets issued by the airlines concerned, when issued, shall constitute the sole contract between these airlines and the purchaser of this tour and/or tour members.

Price of the tour is based on the value of the United States dollar in relation to foreign currencies and on tariffs in effect on the date of publication of this brochure and is subject to adjustment (either way) prior to departure should such exchange rates or tariffs change.


Publication date: January 27, 1996



Bucuresti, vara anului 1937. (Colecția Ion C. Rogojanu)

Nur la aŭtoj havas epokojn; la azenoj humilaj restas ĉiam samaj.

ROMANIA - A COUNTRY EMERGING FROM THE SHADOW



30 July - In **Sibiu** we will visit the wonderful **Brukenthal Art Museum** and have a chance to enjoy strolling along narrow, sinuous streets in search of history and quietness. Between **Sibiu** and **Braşov**, we will view the beauties of this mountainous country. Situated at the foot of the Carpathians, **Braşov** is a major gateway to the South-Eastern Transylvanian Alps. The history of this both old and new city is strongly tied to the history of the ethnic groups living here. Although the city itself offers many attractions, among which the **Black Church** is foremost, its surroundings are the biggest attraction in the area. Worth mentioning are, among many others, the town of **Sinaia** with its royal **Palace Peleş**, and the village **Bran** and its castle, that offered shelter to the famous **Vlad the Impaler**. We know this man as **Dracula**. B L D

31 July - Those who like mountains will find **Braşov's surroundings** a paradise. We will have some free time to enjoy this charming city, and if time permits, we may have an optional excursion into the Eastern Carpathians to enjoy a hot mineral bath in one of the many spas. B

1 Aug. - Traveling north from **Braşov**, we shall pass by **Szekely Land**, a region inhabited by people who speak a distinctive, charming dialect of Hungarian. **Târgu Mureş's** downtown is the only city center built in recent decades in Romania that has a distinctive personality and style. An after-lunch stroll along **Roses' Plaza** is a must to admire the **Secession** and **Fin de Siècle** architecture styles. **Târgu Mureş** is yet another place where **Andreo Cseh** spent a few years promoting our language.

This afternoon we arrive in **Cluj-Napoca**, the "capital" of Transylvania. **Cluj** has much to offer, from still-standing **Dacian walls** to **St. Michael Gothic Church** to **Baroque houses** to modern museums. One of the major cultural centers of Romania, **Cluj** is also an education center with the third largest university. Exactly 440 years ago, the **Unitarian Faith** was founded here, and the **oldest Unitarian Church** in the city celebrates its 200th anniversary this year. B L D

2 Aug. - A trip to the mountains covered with evergreen firs is a unique experience in an area where "modern civilization" is just an entry in fancy dictionaries, where wooden flutes and taragots are part of the everyday music. Yet, in recent years, patches of holiday villas and cottages have sprung up in this delightful "natural" area. Our lunch will be taken at lovely **Fântânele Lake**. The **Călăta valley** has been seen for the last 100 years as the place where authentic **Magyar peasant culture** has survived the best. And one of the villages in this archaic region has lost to us, one of the best known **American Esperantists**, our own guide - **Ionel**. This evening back in **Cluj**, where we will enjoy a concert by local musicians. B L D



3 Aug. - A trip to **Maramureş** (Northern Transylvania) is like a travel in time, to a time when everything was built of wood; when people wore gorgeous multicolored dresses; when people drank 100-proof plum brandy like water; and when shepherds played their hand-made little wood flutes with the same ability with which they milked their ewes or fought to keep their little universe isolated from the "benefits" of the modern society. The **Merry Cemetery of Săpânţa** is unique for here instead of tombstones, the tombs are marked by beautifully carved, colorfully painted headboards inscribed with witty limereicks and carved with, sometimes, hilarious portraits of the deceased. (One of **Ionel's** favorite tourist destinations.) We return to **Cluj** in plenty of time to say goodbye to our new **Esperantists** friends and to the **Country Emerging from the Shadows**. B L

4 Aug. - Early morning departure to **Budapest**. A sack lunch at the border, then on for a quick view of **Buda** before checking in at our hotel and preparing for a farewell dinner and get-together with local **Esperantists** at the **Esperanto-Domo**. B L D

5 Aug. - Transfer to airport for departure to home. Extra nights in **Budapest** can be arranged, if ordered well in advance. B

Price of Post-UK Excursion:

\$1046 per person, double occupancy
\$125 single supplement

Price of our lovely 4-star hotel Vyšehrad:

\$60 per night per person for a shared double room
\$95 per night for single (limited space available).

Excursion Price Includes:

- Transfer from **Vyšehrad Hotel** to **Prague airport** July 28
- Flight to **Bucharest** July 28
- Transportation, excursions, entrance fees
- Most meals as noted in the itinerary
- Professional guide and interpretation into **Esperanto**
- Pleasure of traveling with fellow **Esperantists** and visiting with local **Esperantists** in **Romania** and **Budapest**.



Price Does Not Include

- Personal expenses such as tips, laundry, alcohol, telephone, passport and visa fees.
- Cost of meals not specifically included in the itinerary.
